**Legantoletero pri "Tombo"**

La artikolo "Tombo – etimologiaj kaj semantikaj rimarkigoj..." de *Wolfgang Viereck* (*Sci. Rev.* 1/2006, p. 23-32) estas tre sperta kaj interesa. Tamen, oni konsciu ke, pratempe, fositaj tomboj estis neniel religiaj aferoj. Kiel ankaŭ hodiaŭ, kiam necesas malhavi ĉe sia loko multajn samtempe mortintojn (ekz. post masakro aŭ natura katastrofo), oni ĝenerale enterigas ilin. Tio necesas, por malhavi al si putrantajn, malbonodorajn korpojn. Kompreneble, ekzistas alternativoj. Surmare, oni disponas mortitojn per subakvigo; en lagoj aŭ riverojn, prefere oni alkroĉu pezilon por malhelpi la postan resurfaciĝon de la putranta korpo. Pratempe, kelkajn korpojn oni disigis en arbaron, por formanĝo fare de sovaĝaj bestoj, aŭ en montaron, por formanĝo fare de rabobirdoj. Kelkloke tio okazas ankoraŭ nun. Mumiigo estis komplika kaj multekosta afero, taŭga nur por eminentuloj. La forbruligo de korpo estas malfacila – oni bezonas fortan fajron. Pli oportune estas enterigo, kondiĉe ke la grundo estas enfosebla. Se ne, ekz. ĉe rokaj lokoj, oni devas konstrui por la korpo ŝtonan sarkofagon. Nur poste, eble jam dum paleolitaj tempoj, oni aldonis religiajn aspektojn al la afero, kaj tial la nomigo kompliкiĝis.

*Ralph A. Lewin*
*SIO-UCSD, CA 92093-0202,* Usono <rlewin@ucsd.edu>

**Ankoraŭfoje: legantoletero pri "Tombo"**

Profesoro *Viereck* en sia interesa artikolo (SR 204, Vol 57, 2006 (1), p. 23-32) pritraktis multaflanke vortoformojn de "tombo" en diversaj lingvoj. En paĝo 28 (ĉapitro 1.3.2. Finno-ugraj lingvoj, alineo 1.3.2.1) estas mencita: "gudrokavo", finne *tervahauta*, kio signifas 'gudrotombo'. En la finna lingvo "*hauta*" signifas ne nur "kavon en la tero por mortintoj", sed estas ankaŭ uzata por aliaj fositaj kavoj (por diversaj celoj) kaj traduko "gudrotombo" donas eblon al miskompreno. Pli bona estas "gudrokavo", ĉar "*tervahauta*" estas ejo por produkti gudron el pinlignaĵoj per piroliza distilado. Do, "gudrokavo" havas nenian rilaton kun tombigo de mortintoj, sed gudro estis – dum la pasintaj jaroj de lignaj ŝipoj – grava eksportartikolo de Finnlado por "ŝmiri per gudro ŝipon"(Z). (Ligna gudro estas fakte naturproduktaĵo kontraŭ putrado de ligno mem, kaj ne tiom difektiga kiom gudro el ŝtonkarbo. Nun Eŭropa Unio volas malpermesi la uzadon de "gudro" kaj ne volas konfesi la diversecon inter ligna kaj ŝtonkarbona gudro. La situacio estas same kiel en sovetiaj tempoj: Moskovio ne sciis, kiam en Estonio estas ĝusta tempo por semi la kampojn...). Aliaj uzoj de "*hauta*" = kavo: kiel surtera "mino" por preni diversajn teraĵojn, ekz. "*savihauta*" = argilkavo por preni argilon, "*hiekkahauta*" = sablokavo (sablejo) por preni sablon, "*sorahauta*" = gruzokavo, "*mutahauta*" = torfkavo ("*muta*" estas formo de torfaĵo, sufiĉe longatempe formiĝinta el torfo en naturo sur la marĉo).

*Pentti Makkonen*
*Vaasankatu 27 A 19 FI – 40100* Jyväskylä, Finnlando



## Scienca eĥo

### Tradicio

En gazetoj kaj aliaj ĵurnaloj, la horoskopoj komenciĝas ĉiam per la "Virŝafo", ĉar por astrologoj la jaro komenciĝas per la "printempa punkto", kiu konformas al la zodiaka signo de la Virŝafo, same kiel la "somera punkto" al la Kankro, la "aŭtuna punkto" al la Pesilo kaj la "vintra punkto" al la Kaprikorno. La kaŭzo por tio estas, ke la astrologoj apartenas al tre malnova, do tre tradici-konscia gildo. Ankaŭ en la Romia Imperio la jaro komenciĝas kun Marto kiel la unua monato. Pro tio la lastaj kvar monatoj de nia nuntempa jaro nomiĝas (laŭ la nombroj entenataj en ili) sep ĝis dek – latinlingve *septem, octo, novem, decem*. Nur ĉ. 150 a. K. oni translokis la jarkomencon sur la 1-an de januaro, kiu en Britujo ankoraŭ ĝis 1732 estis la 25-a de marto. Kiel tradici-riĉa gildo la astrologoj ĝis hodiaŭ persistas pri la printempa jarkomenciĝo. (2007-08-13)

### Utila importo

Ne estas mirinde, ke la ĉevaloj perditaj de la hispanoj sin sentis tre bone en la vastaj ebenaĵoj de norda Ameriko. Nu, iliaj antaŭuloj ja ĝuste tie evoluis antaŭ 40 milionoj da jaroj. Poste ili migris okcidenten tra la Beringlanda ponto al Azio, kie ili postvivis kaj bone prosperis, dum la amerika praĉevalo por ĉiam forpasis. La indianoj, kiuj delonge jam tenis hundojn kiel dombestojn kaj sciis kiel manipuli ilin, nun transigis siajn spertojn sur la ĉevalon. Dum antaŭe hundoj trenis la ŝarĝosledojn – la "*travoisojn*", nun la ĉevaloj kapablis pene porti eĉ la grandajn tendojn – la "*tipiojn*". Konsekvence la indianoj de la *Lakota*-tribo nomas siajn ĉevalojn "sanktaj hundoj". (2007-07-19)

### Geniulo mistaksita

Akurate meznokte, la 10-an de julio 1856, naskiĝis *Nikola Tesla* en dalmatia vilaĝo. Li diponis pri tutspecialaj talentoj, kiuj igis lin unu el la plej elstaraj eltrovintoj. Antaŭ siaj "mensaj okuloj" li eltrovis maŝinojn – kaj kiam li vere konstruis tiajn maŝinojn, ili tuj senmanke funkciis. Sed liaj eltrovaĵoj nur nuntempe estas aprezataj kaj trovas agnoskon: estis *Tesla*, ne *Edison*, kiu disvolvis la energi-transigon per alterna kurenta transformado, estis *Tesla*, ne *Marconi*, kiu eltrovis la radioaparaton, estis *Tesla*, kiu jam antaŭ cent jaroj kreis la bazojn por la komputil-teĥniko, la satelita radiofonto kaj la spac-veturado.

*Tesla* ofte havis ĉielstormajn celojn. Li volis per altfrekvenca kurento lumigi la ĉielon kaj estigi artefaritajn kuglofulmojn. Tamen ĉe ĉio li ofte ne atentigis aŭ eĉ ignoris la evidentan, la facile kompreneblan, la fakte fareblan. Fine li loĝis, forgesita kaj amarsenta en novjorka hotelo. Amikoj pagis por li. Sed li pensis, ke li loĝas senkoste estante tiom fama. *Tesla* tie mortis la 7-an de januaro 1943. (2007-07-09)

## Malkovrita – kaj 200 jarojn trankvilo

Laŭ la komisio trovi la mitan sudkontinenton kaj al kristanismo konvertendajn popolojn kaj – precipe – oron, en la jaro 1595 hispana ŝiparo sub kapitano *Alvaro de Mendanna de Neyra* (ĉ. 1541-1595) forlasis sian bazon en Peruo trans Pacifikon. Dum la vojaĝo ili malkovris la insul-grupon Markezoj (*Marquesas*). Kvankam la loĝantoj la fremdulojn afable bonvenigis, tiuj tuj ekzekutis 200 el la indiĝenoj. Tamen la paganoj kapablis malhelpi la fondon de kolonio kaj poste havis trankvilon antaŭ la blankuloj. Ĉar tiam ankoraŭ ne eblis determini la gradojn de longitudoj, kaj la poziciaj indikoj estis tre malperfektaj. Post la Markezoj, kapitano *Mendanna* volis ankoraŭfoje viziti la Salomonojn oriente de Novgvineo, malkovritajn de li jam en 1567. Sed li maltrafis ilin – same kiel ĉiuj aliaj maristoj dum la sekvaj 200 jaroj. Nur en 1767 ili estis "remalkovritaj" de *Philip Carteret* kaj 1768 de *Louis-Antoine de Bougainville*. (2007-06-07)

## Poŝtelefono kaj fritkolbaseto

La zorgo de esploristoj celas al la nervoĉeloj kaj sinapsoj de la cerbo. Je la ekstremaĵoj de la nervoĉeloj algluiĝas jonoj – elektre ŝargitaj atomoj – kiuj ebligas la ĉelan komunikadon. Kaj la poŝtelefonaj radioj svingas tiujn jonojn. Kiom forte, tio ne estas rekte mezurebla. Oni ja ne kapablas enpenetri termometrojn en la ĉelojn. Tial antaŭnelonge sciencistoj de la Maksplank-Instituto – per tre malgrandaj grasgutoj – simulis iuspecan "koncentritan likvan cerbon". Sub tiaj cerboproksimaj kondiĉoj oni mezuris post poŝtelefonradiado temperatur-pintojn ĝis 100°C – dekfoje pli alte ol supozite. Se oni varmegigas fritkolbaseton kaj terpomkaĉon en la mikro-onda fornelo, la kolbaseto pli rapide varmiĝas ĉar ĝi enhavas tre fajnajn grasgutetojn ĉirkaŭatajn de akvo. Kaj la cerbo bedaŭrinde estas pli fritkolbaseto ol terpomkaĉo. La esploristoj maltrankviliĝas. Ili tamen evitas tro hastajn konkludojn. Cetere ili scias, ke la poŝtelefona industrio disponas pri bonegaj advokatoj. (2008-07-14)


# Scienca Revuo Vol. 60 (2009) (2) / n-ro 217

**Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)**
**Hejmpaĝo: http://www.eventoj.hu/isae/**

Pres-indikaĵoj: ISSN 0048-9557.
Eldonanto: ISAE Eldonkvanto: 200 ekzempleroj
Laserkopiita: Marto 2009 ĉe *Copy & Co, Marktplatz 30 DE - 37269 Eschwege*/Germanio
Redakcia komisiono: La estraro de ISAE kaj la du honoraj membroj


Membrokotizo de ISAE : € 20,00/jare
pagebla pere de via
a) landa peranto (resp. landa delegito)
aŭ rekte al
b) ISAE-konto ĉe UEA/*Rotterdam* (NL): isae-z [*)] *vd. sube*
IBAN: DE51 3701 0050 0318 2915 09, BIC: PBNKDEFF
t. e. por ISAE-anoj el Germanujo: vi pagu (anstataŭ kiel pli frue al ISAE/Sachs) al la germana poŝtĉeka konto de UEA n-ro 3182 91 509, BLZ 370 100 50 en *Köln*, Germanio, kun indiko "ISAE-jarkotizo (...jaro...) por UEA-konto isae-z"

### Landaj Perantoj de ISAE

| | | |
|---|---|---|
| Aŭstralio | *Libroservo AEA*<br>*143, Lawson St., Redfern, AU 2016 N.S.W.* | *<libroservo@esperanto.org.au>* |
| Brazilo | *Brazila Esperanto-Ligo (BEL)*<br>*C.P. 03625 BEL, BR 70084-970 Brasília* | *<bel@esperanto.org.br>* |
| Britio | *S-rino Viv O'Dunne*<br>*p.a. Esperanto Asocio de Britio (EAB)*<br>*Station Rd., Barlaston*<br>*Stoke-on-Trent, Staffordshire, ST12 9DE Britio* | *<eab@esperanto-gb.org>* |
| Finnlando | *S-ino Päivi Saarinen*<br>*Ruorimielenkatu 5 C 23, FI-02320 Espoo* | *<paivi.saarinen@iki.fi>* |
| Francio | *S-ro J.Charles Trébouet*<br>*Ferme de Monchy, FR-60390 Auneuil* | *<trebouet.bohere@club-internet.fr>* |
| Irlando | *S-ino Joy Davies*<br>*9, Templeogue Wood, IE-Dublin 6W* | *<noviresp@eircom.net>* |
| Korea Resp. | *S-ro Cho Sung Ho*<br>*Biol.Fak.Inha Univ., KR Inchon 402-751* | *<shcho@inha.ac.kr>* |
| Norvegio | *Eldonejo Esperanto*<br>*Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo* | *<hara-ryg@online.no>* |
| Pollando | *S-ino Magdalena Tatara*<br>*Košmice Wilkie 323, PL32-020 Wieliczka* | *<mtatara@gmail.com>* |
| Svedio | *S-ino Lisbeth Andréasson*<br>*Kajsa Kavats gata 8, SE - 24235 Hörby* | *<bertil.andreasson@horby.mail.telia.com>* |
| Usono | *Esperanto-USA*<br>*1335 Stanford Ave, Suite 300, Emeryville CA 94608, USA* | *<elna@esperanto-us.org>* |

**[*)] Nepre informu pri via membrokotizpago laŭ b) (kun indiko de la kompleta poŝtadreso kien estu sendata Scienca Revuo) la eldonanton:**
**Prof. Dr. R. Sachs, Vor dem Brückentor 3, DE-37269-Eschwege/Germanio**
**Tel. xx49-(0)5651-331866; <ISAESachs@aol.com>**